

Sonorilo

64-a jaro, n-ro 3

majo-aŭgusto 1972

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St. Bernardsesteenweg 1078,
2710 Hoboken.
Poŝtĉekkonto: 1634.34 de BEF, Oude Donkiaan 83,
B-2100 Deurne.

Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.

Ĉefredaktoro: Fernand Roose.

Redakcia sekretario: Paul Peeraerts.

Krome kunlaboris al tiu ĉi revuo: Greta Bol (Kalmthout), Ria de Cleyn
(Antverpeno), Gian-Carlo Fighiera (Bruselo), Henny
Jacques (Antverpeno), Rosette van Herck (Antverpeno),
Jules Verstraeten (Antverpeno), Imelda Wuyts (Antverpeno).

NOVA ESTRARO DE BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Dum la lasta jarkunsido de Belga Esperanto-Federacio, oni elektis la jenan estraron:

Federacia prezidanto:	D-ro P. Denoël (Lieĝo)
Vic-prezidantoj:	S-ro R. Jacobs (Bruselo), S-ro C. Poupeye (Bruĝo)
Ĝen. sekretario:	S-ro J. Verstraeten (Antverpeno)
Federacia kasisto:	S-ro R. Bailleux (Antverpeno)
Komitatano UEA:	S-ro G. Maertens (Bruĝo)
Ĉefredaktoro 'Sonorilo':	S-ro F. Roose (Bruĝo)
Direktoro de la librejo:	S-ro R. Iserentant (Bruĝo)
Reprezentanto BEJA:	S-ro P. Peeraerts (Antverpeno)
Ĉefdelegitino UEA:	F-ino A. Orsolini (Karloreĝo)
Membroj:	S-ino E. Ernst (Bruselo), S-ino Fichet (Karloreĝo), S-ro G.C. Fighiera (Bruselo), S-ino A. Héron (Vervierso), S-ro R. Paulus (Karloreĝo).

MET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

AOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - CABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

POR PLI TAŬGA REVUO

Por garantii pli regulan aperadon de nia revuo "Sonorilo", BEF-instancoj plurfoje kunsidis.

Krom la du nacilingvaj revuetoj "Esperanto-Panoramo" kaj "L'Espéranto en Marche", nia asocio devas daŭre disponi pri interna bulteno: la oficiala kaj komuna organo de la Federacio. Ĝi estas vivanta ligilo inter estraro, administrantaro kaj la membroj, kaj ankaŭ inter niaj lokaj grupoj, kies aktiveco restas la esenca kondiĉo de nia propagando.

Ni ja celas varbi kiel eble plej grandan nombron da membroj-abonantoj al UEA, kaj krome abonigi ilin al interesaj internaciaj gazetoj, kiel "Heroldo de Esperanto", "La Monda Lingvo-Problemo", k.s., sed la financaj ebloj, la tempo por legi, la lingva nivelo ne estas egalaj ĉe ĉiuj niaj membroj. Ili tamen rajtas regule ricevi pli modestan sed kontentigan revuon, kun freŝaj kaj koncizaj informoj: pri la ĉefaj okazaĵoj en la grupoj kaj pri iniciativoj por Esperanto je loka nivelo — pri la pulsado de la Movado en la mondo — pri la laboro de BEF kaj de aliaj esperantaj organizaĵoj en Belgio — pri la nova literaturo en Esperanto.

Kelklinia regule aperanta prezento de ĉiuj nov-aperintaj libroj kaj de elstaraj artikoloj el la esperanta-gazetaro havos edukan valoron por la plej malnova kiel por la plej nova BEF-ano, kiu laŭvole povos trovi pli detalan pritrakton en la fakaj aŭ ĝeneralaj revuoj.

Nenio povas esti perfekta kaj respondi ĉies guston. Cetere la kostoj por eldono de nia "Sonorilo" limigas nian deziron al perfekteco. Ne ĉion el la membraj kotizoj kaj ŝtataj subvencioj ni rajtas uzi tiurilate.

Por tamen provi kompensi la limigon de niaj ekonomiaj rimedoj, ni decidis: unue plifortigi la redaktadon per aldono de *redakcia sekretario*, kies tasko estas ĉion fari por ke la revuo aperu regule; due instigi reton da korespondantoj, kiuj koncize kaj en deca skribo, kontribuos al aktuala informado.

Per ĉies kunlaborado ni atingos pli taŭgan revuon.

D-ro P. DENOEL

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Kapitalo: 142 005 BF aldonaj pagoj akceptataj pere de la pĉk 2914 29 de
Maertens G., Brugge 3.

Donacoj al la fondaĵo pere de oficiala akto (ekz. per notaria akto) estu adresitaj al BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, asocio leĝa, por la fondaĵo. Antaŭdankon!

ANTVERPENO, INSTIGO AL PLIAJ

SUPERNACIAJ ARANĜOJ

Pri la Internacia Kongreso okazinta en Antverpeno de la 28a de aprilo ĝis la 1a de majo, oni povus verki kompletan libron. La internacieco de la partoprenintaro (462 personoj el 14 nacioj), la diversaj konataj prelegantoj, la eksterordinara atmosfero, la kvazaŭ perfekta organizo, ĉio tio kontribuis al la sukceso de tiuj ĉi kvar tagoj kiujn la plimulto ne baldaŭ forgesos. Instigo la kongreso certe estis por daŭra kunlaborado inter la landaj asocioj kiel BEF, GEA, LEEN k.a. unuflanke kaj la lokaj agadgrupoj kiel la Markolanoj kaj la Trilanda Renkontiĝo aliflanke.

La programo komenciĝis per akcepto en la Antverpena Esperanto-Grupo "La Verda Stelo", festanta sian 65-jaran jubileon, kiu prezentis al la kongresanaro filmon kaj diapozitivon pri sia urbo, sub gvidado de la antverpenano s-ro R. van Eynde, spertulo ĉi-rilate. Kvankam pro la amplekso de la programo, ne ĉiuj ĉeestantoj havis tempon por viziti la Skeldan urbon, ili tamen tie ĉi ekhavis bonan impreson pri ĝi, kaj cetero... sur la dia'oj la suno brilis!

Bedaŭrinde la sabaton la verda standardo pendis malgaje kontraŭ la masto pro la torenta pluvego. Eble tio ĉi estis la kialo de la ĉiam grandiĝanta homamaso kiu jam longe antaŭ la malfermo de la ĝiĉetoj interpretiĝis en la akcepta halo.

Posttagmeze, s-ro Paul Peeraerts parolis pri Esperanto Programita. Bedaŭrinde, s-ro Hermann Behrmann, la iniciatinto de la kurso, ne povis ĉeesti. Malgraŭ tio la aŭditorio ne estis sufiĉe granda, ĉar la kongresanoj kiuj interesiĝis pri tiu temo estis tre multnombraj. Paul Peeraerts klarigis la sistemon de la programitaj lecionoj de Hermann Behrmann kaj ankaŭ komparis la statistikojn enlandajn kaj tiujn de Germanujo.

Amikeca atmosfero! Sukcesinta parto de la Kongreso. (gb)

La oficiala malfermo estis tie ĉi kiel ofte unu el la plej imponaj momentoj. Unuavice venis reprezentantoj de naciaj kaj internaciaj organizoj kaj reprezentantoj de oficialaj landaj instancoj kiuj salutis la kongresanaron kaj deziris grandan sukceson al la okazaĵo. Unu el la du ĉefpunktoj el la malfermo estis la parolado de d-ro H. Brugmans, rektoro de la Eŭropa Kolegio en Bruĝo. La rektoro estas ne-esperantisto, sed eble jam faris pli por la movado ol multaj verdstelanoj, i.a. pledante en la belga televido por enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La rektoro parolis pri siaj spertoj kun tradukistoj kaj interpretistoj, kiuj ne precize pledis por tiuj ĉi lastaj. Li emfazis ke la lingvo-problemo ĉiun tagon grandiĝas kaj ke precipe tion la esperantistoj devas eluzi, forlasante sian izolitecon.

La kongresprezidanto, s-ro Jo Haazen, siavice montris ke en la diversaj internaciaj organizoj, la lingva situacio iĝas pli kaj pli absurda. Li apelaciis al ne-perforta revolucio de la esperantistaro.

Kiel distraĵon inter la multaj prelegoj, f-ino Maria van Beveren ludis gitaran muzikon, alte taksatan de la ĉeestantoj. (rdc)

Por aliaj la ĉefpunkto de la kongreso eble estis la kongresa balo. Ĝi okazis en granda bela moderna dancejo. Pli ol 360 homoj ĉiu-aĝaj amuziĝis dum kvin horoj, sed tamen precipe la junularo nelacigeble aktivis. La muzikon unike prizorgis HiFi-Studio kun la disk-ĵokeoj Willy Ferny kaj John de Wit. Krom la plej konataj muzikaĵoj aŭdiĝis ankaŭ diversaj Esperanto-kantoj. Eddy kaj Niki Frederickx prezentis tombolon kun dekoj da valoraj premioj. Preskaŭ ĉiu havis bonŝancon! La atmosfero estis de la komenco ĝis la fino streĉe entuziasma. Laŭ multaj ĉeestantoj la balo estis eĉ unu el la plej sukcesintaj kaj agrablaj de la lastjaraj Esperanto-kongresoj. (iw)

S-ro Hans Bakker, speciale komisiita de L.E.E.N., parolis pri "Aplikado de Esperanto en la ĉiutaga vivo".

La paroladisto rakonteme raportis pri siaj spertoj sur tiu tereno en Nederlando. Jen pro rilatoj, jen pro subitaj ideoj li akiris neatenditajn sukcesojn en la telefon servo, en restoracioj, en stacidomoj, en butikoj, ĉe komercistoj, turismaj oficejoj, radio, televido.

Li montris plurajn tabulojn, menuojn, kaj anoncilojn kiujn li kunportis por atesti pri la diversaj eblecoj akireblaj se oni nur sufiĉe insistas kaj penadas ĉe la oficialaj instancoj aŭ publikaj servoj.

S-ro H. Bakker vigle pledis por ke oni agu same en la aliaj landoj. Se oni sukcesus komune agadi, la rezulto estus des pli efika kaj konvinka. (jv) Dimanĉmatenon sur la Steenplaco, malgraŭ griza ĉielo, kiu poste naskis abundan pluvon, kunvenis centoj da kongresanoj por viziti la urbon.

Sub gvidado de s-ro J. Verdonck, oficiala gvidisto de la urba Turista Servo, s-inoj H. Jacques kaj R. van Herck kaj s-roj I. Durwael kaj R. van Eynde, 3 grupoj promenadis laŭ la Steen, la buĉista domo, la katedralo kaj la granda placo, kie parto de la promenantoj forlasis la ekskurson por la oficiala akcepto en la urbodomo. Post ĝisdetalaj klarigoj pri legendoj kaj arthistorio, oni daŭrigis la promenadon al aliaj rimarkindaj lokoj kaŝitaj en stratetoj kiujn la kongresanoj solaj ne facile estus trovintaj. Post 1h.30 la partoprenantoj miris jam troviĝi antaŭ la bela baroka fasado de la preĝejo S-ta Karolo, la finpunkto de la ekskurso. (rvh)

Katolikoj kaj kristanoj havis la okazon ĉeesti Diservon laŭ ekumena spirito kiu okazis en la fama preĝejo Sankta Carolus Borromeus. La prediko de la pastorino J. Koopmans estis bona kaj klara. La fakto mem ke estis pastorino estis en si mem tre simpatia kaj tute moderna. La multaj ne-esperantistaj vizitantoj estis surprizitaj aŭdi tute fremdan lingvon, poste ili aŭdis ke tiu lingvo estas Esperanto kaj estis impresitaj pri tiu fakto. (fr)

Antaŭ plenplena salono, Prof. G. Waringhien, la prezidanto de la Akademio kaj la klera esperantologo, prelegis pri "La lingvo kaj stilo de Zamenhof".

El la kvar kriterioj, kiujn la kreinto de Esperanto fiksas al si por sia laboro, simpleco, reguleco, klareco kaj stabileco — prof. Waringhien detale analizis la klarecon. Ĝin, tamen, oni akiras nur je kosto de la simpleco.

La klareco de la Esperanta fonetiko baziĝas sur la limigo de la nombro de vokaloj. La klareco de la vortoj ŝuldiĝas al la adaptaj enkondukitaj, por ke ili ne prezentu erarigan similecon kun afiksoj, prepozicioj aŭ sufiksoj. Gramatike, la t.n. "redundancoj", nome ne nepre necesaj elementoj — ekzemple la finaĵoj de la adjektivoj — kontribuas al la klareco de la lingvo.

Koncerne la stilon de Zamenhof, la preleganto memorigis, ke la kreinto de Esperanto konsilis uzi simplajn vortojn anstataŭ kunmetitaj. El ĉ. 4 500 Zamenhofaj kunmetitaj vortoj, nur 18 estas triradikaj.

Prof. Waringhien dissekciis la stilon de Zamenhof, lian vortordon, frazkonstruon kaj oratorecon, kaj finis atentigante pri la devizo: "Kio ne estas klara, tio ne estas Esperanta". (gcf)

Sub gvidado de d-ro John Wells kaj en kunlaboro kun d-ro Werner Bormann kaj s-ro Grégoir Maertens, okazis publika debato pri "Kiamaniere ni esperantisto povas helpi al sociaj kaj lingvaj malplimulto?" Post longa interparolo estis kompilata rezolucio kiu tekstas jene:

La Kongreso

- (+) **notas** la fakton ke en pluraj eŭropaj kaj ekstereŭropaj ŝtatoj aro da etnaj grupoj malhavas adekvatajn eblecojn de normala uzado de sia respektiva gepatra lingvo kaj do suferas lingvan kaj kulturen diskriminacion;
- (+) **atentigas** pri la fremdiĝo de diversaj nacioj rilate al siaj propraj lingvo kaj kulturo pro la premo fare de nombre pli grandaj nacioj;
- (+) **apelacias** al la responsuloj en la politika kaj kultura sferoj efektiviĝi — sur ŝtata kaj internacia niveloj — la fundamentan rajton de ĉiu homo en sia etna regiono utiligi sian gepatran lingvon en instruado, scienco, radio, televido, gazetaro, ekonomio, literaturo, politiko kaj ĉiuj aliaj homaj aktivecoj;
- (+) **emfazas** — plian fojon — la eminentajn avantaĝojn troviĝantajn en la ĝeneraligo de la aplikado de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto en ĉiuj rilatoj inter diverslingvaj grupoj;
- (+) **alvokas** la organizojn kaj individuojn en la Esperanto-movado amplekse informiĝi pri la situacio de la minacataj etnoj kaj tre atente sekvi la okazaĵojn en la respektivaj regionoj.

Admirante dum la dimanĉa artvespero la popoldancojn, kelkaj certe pensis pri la postmilitaj kongresoj de la Flandra Ligo, kie okazis similaj manifestacioj, sed faritaj de esperantistoj mem. La ĥoro estis agrabla apero kaj kantis mirige bele. La deklamadoj estis bonaj sen pli. Bedaŭrinde ke ne ankaŭ estis iu teatraĵeto, sed pri tiu manko ni ne volas certe akuzi la organizintan grupon kiu efektive dronis en la laboro. La fino de tiu ĉi artvespero venis tiel abrupte (en la tuta senco kiun la PIV donas al tiu vorto!). Jes, la lasta numero estis antaŭe anoncita kiel lasta. Tamen devus esti io pli, saluta vorto, aŭ prezento de la artistoj aŭ io simila. (fr)

Al la prelego de s-ro Eddy Frederickx, doktoriĝanto pri klasika filologio, "Johannes Goropius Beccanus, medicinisto kaj filologia pioniro el la Rondo de Kristoforo Plantin", pluraj kongresanoj certe iris ne sciante pri kio la tuto temus. Tamen ili certe ne bedaŭris ĉar iĝis amuza antaŭtagmezo pri homo kiu siatempe (16-a jc.) "pruvis" ke la nederlanda lingvo, kaj precipe ĝia antverpena dialekto, estis la lingvo de la unuaj homoj. Iom bedaŭrinde ke multaj spritaĵoj ne estis facile kompreneblaj de tiuj kiuj ne regas profunde la nederlandan lingvon.

Lundon posttagmeze, post la oficiala fermo dum kiu oni invitis la ĉeestantojn partopreni en la venonta kongreso en Luksemburgo, okazis vizito al la planedarejo en la urba Zoologia Ĝardeno. Estis tiom da vizitantoj, ke eĉ deko devis sidi sur la planko. En la malluma cirkla salono oni povis vidi sur la kupola plafono la diversajn konatajn stelarojn, la levigantan kaj subirantan sunon, la lunon kun ĝiaj diversaj fazoj, ktp. Post tiu ĉi duonhora sed interesege klarigo, multaj ankoraŭ vizitis la zoon mem kie precipe la delfenoj kaj kompreneble la simioj estis grandaj allogaĵoj.

(hj)

Fina konkludo pri la Kongreso: ĝi estis impona pro la multaj diversaj program-punktoj kaj laboroj kaj pro la tre granda ĉeestantaro. La kadro iom similis al tiu de universalaj kongresoj. Malgraŭ la kelkaj mankoj kaj malgataĵoj (ne ĉiam eviteblaj) mi kredas ke ĉiuj estas tre kontentaj pri la kongreso. Ni povis konstati ke la organizintoj devis tre multe labori, sed faris tion bonege! (Ofte ni rigardis al la serioza mieno de la prezidanto Jo Haazen kiam li superrigardis ĉion kion oni faris, kiam li anoncis, prezidis ktp.!) (fr)

KONKURSO SIMONDETTI

Ĉiujare la Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) aljuĝas sian Premion Simondetti, en valoro de 1 000 fr. (20 us. Dolaroj), al elstara artikolo originala aŭ tradukita, pri la tre ĝenerala temo "Natura". Por 1972 partoprenis en la konkurso ĉi sekvaj tri kandidatoj, el kiuj la unua nete gajnis:

L.K. Hunnes el Norvegujo kun "La granda Aŭko"

R. de Roover el Belgio kun "Bubuĉjo, la Noktuido"

J. Lazauskas el Litovujo kun "Urogalo en Litovio".

Ĉiuj partoprenantaj artikoloj aperas konforme al la regularo en "La Mevo", organo de ORE, kaj rajtas pritrakti iun ajn best(ar)on aŭ plant(ar)on.

Kandidatoj por la konkurso 1973 bonvolu peti regularon al la sekretario M. Halvelik, Gebr. Blommestraat 41/0, B-2200 Borgerhout.

NEKROLOGO

La 19an de marto mortis f-ino Mathilde Kestens, kiu seninterrompe restis fidela al la Brusela Grupo, al BEF kaj al UEA dum 39 jaroj. El la funebra parolado de s-ro Jacobs, prezidanto de la Brusela Grupo, ni ĉerpas la jenon:

"Estante Esperantistino ĝis la fundo de sia koro, f-ino Kestens partoprenis tre regule en niaj lundaj kunsidoj, en niaj festoj kiujn ŝi ŝatis, en niaj kongresoj naciaj kaj internaciaj. Ankaŭ profesie ŝi subtenis Esperanton. Efektive, en ŝia librejo oni ĉiam trovis esperantajn verkojn kaj informojn. Ŝia memoro restas inter ni kiel tiu de sindona samideanino, kiu ĉiam nelacigeble sekvis la rektan vojon!"

BIBLIOGRAFIO



La libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“ (s-ro Iserentant R.), Kerklaan 61, BRUGŬO, Poŝtĉekkonto 152140.

Isaj Dratwer: "Pri Internacia Lingvo-Dum Jarcentoj". Eldono de la C(entro) de E(sploro) kaj D(okumentado), Wembley, Anglujo en la jaro 1970. 141 p. Ofseta. Prezo: 6 Ned. gld.

Jen tre valora libro por ĉiu propagandisto de Esperanto, por ĉiuj Esperanto-grupoj. Ĝi prezentas eldirojn pri la Internacia Lingvo de nombro de politikistoj, sciencistoj, verkistoj ktp. Ĝi estas kompreneble tre malkompleta; en enkonduko, prof. Lapenna demandas ke legantoj helpu serĉi pliajn tiajn eldirojn, kopiu la nacilingvajn tekstojn, kun esperanto-traduko, kaj kun tre preciza fontindiko, kaj sendu tiun materialon rekte al s-ano I. Dratwer, Bat Jam, Poŝtkesto 419, Israelo. Ni ja bezonas la konon de tiaj eldiroj; sed ni certe tiel grave devas koni la ĝustan eldiron — kiun ni povu kontroli per rigore komplementa kaj ĝusta fontindiko. Tio lasta seniluziigas nin en la jena libro. Por multaj estas indikita nur iu esperanto-revuo. Se la aŭtoro en tiu revuo ne trovis pli precizan sciigon, li devis menci tiun. Ĉu en kelkaj kazoj li ankaŭ ne povis sciigi la paĝon de la koncerna verko? Ekz. ĉe la opinio de la fama franca geografo Elisée Reclus en la verko: "L'homme et la Terre"?

Koncerne la valoron de la esprimitaj opinioj, ili estas tre malsimilaj. Kelkaj estas tute banalaj; aliaj estas trafaj kiel ekz. tiu de William James. Tre singarde-maj ni devas esti kiam tiuj famuloj ne nur donas sian opinionon, sed ankaŭ informojn pri Esperanto. Ekzemple laŭ la libro, la Rusa ĵurnalisto I. Ehrenburg diris ke E. kiel deviga studobjekto estis enkondukita en kelkajn distriktojn...de Belgio. Tio estas al ni tute nekonata, kaj ni estas konvinkitaj ke tiu informo estas malĝusta. (Cetere, oficiale ne ekzistas distriktoj en Belgio). Tute kompreneble, kiam oni legas dirajojn kiel ekz. de la germano Brandt, oni faras al si la demandon: se li estas tiel konvinkita pri la graveco de la afero, ĉu li ankaŭ faris ion por ĝi? Plu oni faras la demandon: kie restas la intenco de Enrico Macias surdiskigi kelkajn el siaj kantoj en Esperanto?

Kaj, kara leganto, ĉu vi scias kion diris Kennedy, Maŭ Ze Dong, nia belga generalo Léman kaj multaj aliaj? Ne? Nu, rapide aĉetu la libron.

Drs F.R.

NOVAJ LIBROJ, BROŝUROJ KTP.

BONVENON AL KUOPIO Turisma prospekto kun mapoj, senpage ricevebla ĉe Kuopion Matkailupaivelu, Kuopio, Finnlando.

BULGARIO. 32p. 20 X 20 cm. Turisma prospekto senpage ricevebla de: Komitato de Turismo, pl. Lenin 1, Sofio, Bulgarujo. ESPERANTO LEREN. 8p. 21cm. Senpaga. Ilustrita nederlandlingva listo de Esperanto-lernolibroj kaj -vortaroj por nederlandlingvaj lernantoj, kun prezoj kaj priskriboj. Eld. UEA.

FERVOJA TERMINARO: SPOORWEGVAKWOORDENBOEK (1971) Esperanta-nederlanda kaj nederlanda-Esperanta. 138p. 30cm. Mimeo. 50 fr.

FIAT 127 12p. 30cm. Grandformata kolorilustrita prospekto pri nova aŭto-modelo. Mendebla ĉe FIAT, Torino, Italujo.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO. GRAVAJ KONCIZAJ INFORMOJ. 8p. 19 x 21 cm. Kolorilustrita prospekto. Mendebla ĉe Centra Laborrondo de Esperanto, Germana Kulturligo, DDR-108 Berlin 8, Charlottenstr. 60, GDR.

GLUMARKOJ "INTERNACIA LIBRO-JARO" (1972) folio po 16 markoj, dukoloraj 7 fr.

GENERALA INSTRUADO EN V.D.R., LA (1971) 142p. 19cm. 27 fr. Ses artikoloj pri diversaj aspektoj de la kleriga sistemo en la Demokratia Respubliko Vjetnamio.

HORLOGISTO DE DJEN BJEN FU, LA 413p. 19cm. 34fr. Elektitaj vjetnamaj noveloj el la periodo 1945-1964. 19 noveloj de 19 aŭtoroj. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1971.

KIO ESTAS LA BAHAA RELIGIO...(1969) 60p. 18cm. 30 fr. Enkonduko kun multaj citaĵoj el la bahaaj sanktaj tekstoj.

KUŝANTA TIGRO Lilli Promet (1922-). 75p. 17cm. Ilus. 27 fr. El la estona tr. Alma Lekko. Dek kvar mallongaj noveloj de ŝata verkistino.

MORTO DE SMAIL-AGAO ĈENĜIĈ, LA Ivan Majuraniĉ (1814-1890). El la kroata tr. Josip Velebit. Nova traduko de grava eposo, originale eldonita en 1846 kaj jam tradukita en 38 lingvojn. Ĝi priskribas, en 5 kantoj kaj 1134 versoj, la persekutojn de la turkaj regantoj al kristanoj en Montenegro. 53p. 20cm. 58 fr.

MUZIKA LEKSIKONO, ESPERANTO-LINGVA (1972) J.B. Briano. 95p. 21cm. 118 fr. La unua parto, sur 13 paĝoj, donas simplajn italajn tradukojn de Esperantaj terminoj. La dua parto, sur 74p. donas tradukojn kaj detalajn, foje enciklopediajn difinojn en Esperanto de la italaj terminoj. Mallonga bibliografio.

NOVA TESTAMENTO, LA KAJERO 8. 100p. 22cm. 56fr. Galatoj, Efesanoj, Filipianoj, Koloseanoj, 1 kaj 2 Tesalonikanoj. Eld. Int. Katolika Informejo. Kun referencoj kaj komentoj.

PROBLEMOJ DE ETNAJ MINORITATOJ EN HISPANIO (1971) Arangis: U.J. Moritz. 40p. 21cm. 50fr. Lingvaj kaj aliaj aspektoj de la situacio de la kataluna, galega kaj vaska popoloj. Bibliografio.

RAKONTOJ EL PANĈATANTRA C.H. Dharmatilake. 20p. 14cm. 21fr. Sep rakontoj en tre simpla lingvaĵo el la Kvin Libroj, la antikva fabelkolekto de la sanskrita literaturo.

RESUMO PRI VJETNAMIO (1971) 128p. 19cm. 34fr. Kun mapo kaj fotoilustraĵoj. Superrigardo de geografio, historio, kulturo, institucioj, ekonomio kaj politiko. Fremdlingva Eld. Hanojo.

SUB LA VERDA STANDARDO P. Korte. LABORILO I 41p. 15x21 cm. 42fr. LABORILO II 65p. 15x21 cm. 52fr. LABORILO I kaj II (kune binditaj) 106p. 15x21 cm. 77fr. GVIDILO 98p. 15x21 cm. 58fr. Duparta, ŝatata elementa kurso por infanoj, por instruado laŭ la rekta metodo. Abunde ilustrita per desegnaĵoj. En la Gvidilo troviĝas konsiloj por la instruanto. Jam multfoje represita.

TRANS LA FABELOCEANO...(1931) Ferenc Szilágy (1895-1967) 135p. 20 cm. 135fr. Ledimita bind. Originalaj fabeloj kun vigla stilo, por infanoj kaj plenaĝuloj. Fotorepreso 1972.

URBA PUBLIKA BIBLIOTEKO KORTRIJK: ESPERANTO-SEKCIO (1971) 18p. Mimeo. 28cm. Katalogo. Mendebla ĉe la biblioteko, Guido Gezellestraat, B-8500 Kortrijk.

VASTA LA FLANKO MALDEKSTRA Antti Eskola. 53p. 30cm. Mimeo. Politikaj artikoloj de finna profesoro pri sociopsikologio, tradukitaj el la finna. Mendebla ĉe: Lingvooponto, PF 119, SF-70101 Kuopio 10, Finnlando.

VOĈOJ EL SOVETA LATVIO (1971) 31p. 20cm. 16fr. Artikoloj historiaj, literatura kaj priarta, plus kelkaj poemtradukoj.

Klarigo al la mireganto

Kaptante la okazon danki pro bonvola recenzo pri mia "Disko" en via gazeto (aŭgusto-decembro 1970), mi deziras klarigi al la mireganta recenzinto, kion li ne komprenas. Mi permesas al mi citi el lia recenzo: "La aŭtoro volis kunligi la rakontojn en unu kadro, tiu de ŝipo, kaj de la ĉefaj personoj de tiu ŝipo. Tio estas iom artefarita ĉar, ekzemple, la rakonto "La Infanveturilo" tute ne estas rivela rilate al tio. Plie, ni tre miras ĉar la aŭtoro metis rakonton sub ĉapitro "Amuzisto" (!) Legu ĝin kaj vi same mir(eg)los kiel mi".

Nu, mi estas la unua por konfesi, ke la kadro (la ŝipo) estas "iom artefarita". Sed tio, kion la recenzisto plie diras, tute ne klarigas tiun artefaritecon. La rakonto pri la infanveturilo staras en la ĉapitro "Amuzisto" pro tiu simpla fakto, ke la orangutango, kiu troviĝas sur la preĝeja tegmento kun la infanveturilo, forkuris de unu el la "ĉefaj personoj de tiu ŝipo", nome — la amuzisto! Legu la tutan ĉapitron, kaj vi same malmiros kiel mi!

Johan Hammond Rosbach

DISE EN LA MONDO

La germana novajagentejo DPA la 24an de aprilo teleksis al ĉiuj siaj abonantoj la 60-jariĝon de la egipta Esperanto-instruisto Megalli. Megalli gvidis dum multaj jaroj la movadon en Egiptujo. Li nun estas vic-prezidanto de Tutmonda Esperantista Journalista Asocio.

Fine de junio deko da kursintoj de la urba Esperanto-kurso en Antverpeno ricevis ŝtate rekonitan diplomon pri sia kono de la Internacia Lingvo. Ekde la venonta jaro ankaŭ mezgrada diplomo estos akirebla.

En Francujo, en la regiono de Arles, estas kampadejo en plena naturo kie esperantistoj povas senpage loĝi. Ili nur estu membroj de la Asocio de la Amikoj de la Gejunuloj. Kotizo malgranda. Interesiĝantoj sin turnu al s-ro Gauthier, 11 rue Langevin, F-12 Arles.

UEA denove estas kandidato por la Nobel-pacpremio. La proponon faris parlamentanoj kaj universitataj profesoroj el kvin landoj: Britujo, Ĉeĥoslovakio, Danujo, Francujo kaj Norvegujo.

En la Antverpena "St.—Jan Berchmanscollege", pasintan monaton 12 junuloj sukcesis en Esperanto-ekzameno. Gvidis la kurson s-ro Edī Frederickx. Kelkaj kursintoj jam fervore aktivis. Venontan jaron okazos en la gimnazio elementa kaj perfekta kursoj.

Pasintan aprilon, la Eŭpena Esperanto-Klubo festis la unuan datrevenon de sia fondiĝo. La Klubo havas nun 15 membrojn kon-

traŭ 7 dum la pasinta jaro. Krome 25 gler-nantoj nun studas Esperanton en la loka ateneo. Ĉeestis la feston i.a., d-ro Pol Denoël, federacia prezidanto de BEF, la prezidantoj de la grupoj en Vervierso kaj Akeno, pluraj instruistoj kaj gepatroj de lernantoj. Ni deziras al la juna klubo ĉion bonan!

La Teleac-kurso en la Nederlanda Televido finiĝis. Intertempe la Slovakaj kolegoj en Bratislavo anoncis Esperanto-kurson elsendotan fine de tiu ĉi jaro. La kurso konsistos el 17 lecionoj de 26 minutoj.

Fine de julio, komence de aŭgusto okazis en Portland, Usono, la 57-a Universala Kongreso de UEA. Preskaŭ mil personoj aliĝis al tiu ĉi tria Amerika U.K. La Internacia Junulara Kongreso okazis samtempe en Toruń, Polujo. Pri ambaŭ aranĝoj ni detale raportos en la venonta numero de "Sonorilo".

La 11-an de majo Lovena Esperanto-Asocio invitis s-anon Petro De Smedt el Dendermonde al la Instituto S-ta Kamilo en Korbeek-Lo.

Antaŭ 24 gesamideanoj venintaj el Antverpeno, Belsele, Gentbrugge, Kessel-Lo, Charleroi, Wijgmaal kaj Loveno, s-ro P. De Smedt prelegis je omaĝo al Hector Vermuyten, tradukinto de poemoj el verkaroj de Guido Gezelle, Alice Nahon, Paul Van Ostayen k.a. Deklamis sinsekve Johano Deckers, nepo de H. Vermuyten, Katja Lödör kaj s-ino de Passeroey. Merititaj aplaŭdoj varme dankis preleganton kaj kunlaborantojn.

EL LA ESPERANTA GAZETARO

La maja numero de ESPERANTO enhavis la ĝojigan sciigon ke UEA dum 1971 havis malgrandan profiton, tio precipe danke la ofsetan preson de ĝiaj eldonaĵoj. Sub la titolo "Eŭropaj ŝtatoj kunfandiĝas", d-ro Werner Bormann (Hamburgo) prilumas la lingvajn malfacilaĵojn en EEK. Okaze de la internacia libro-jaro, William Auld atentigas pri la graveco de la literaturo por la ekzisto de Esperanto. Se oni neglektas la literaturon, iom post iom forvelkos la vivanteco de nia lingvo.

La 9a numero de HEROLDO estas grandparte dediĉita al la kongreso en Antverpeno. Apud tre laŭda raportoj pri ĝi, oni trovas ankaŭ la unuan parton de la prelego de d-ro Gaston Waringhien (Parizo) pri la "Lingvo kaj stilo de Zamenhof", kaj raporteto pri la 2a kunordiga konferenco de ILEI, same okazinta en la Antverpena Kongresejo.

Ĉefartikolo en la lasta ESPERANTO GAZETO estas interesa verkaĵo de Tibor Sekelj (Beograd) pri "Sekso kaj antisekso en Novgvineo". La sama aŭtoro en alia artikolo atentigas pri la fakto ke la tempo laboras kontraŭ Esperanto kaj ke oni devas pli ol iam agi nun.

ESPERO KATOLIKA kiu ekde tiu ĉi jaro aperas sub 'nova vestaĵo' (ĉu jes aŭ ne pli bona vestaĵo ni ĉi tie ne prikonsideros), publikigis en la aprila numero la kompletajn tekstojn de la S-ta Meso, kiujn facile povas esti elprenataj.

ETNISMO estas nova revueto eldonata de Uwe Joachim Moritz, Blumenstr. 7, D-511 Alsdorf, Germanujo. En ĝia ĉefartikolo "Kial Etnismo?" la redaktoro klarigas ke la informilo notos faktojn pri la etnoj kaj batalos por respekto antaŭ la propeco de ĉiu etno kaj kontraŭ lingva kaj kultura imperiismo. En la unua numero aperas i.a. ankaŭ la rezolucio akceptita dum la Antverpena kongreso.

KORESPONDI DEZIRAS...

Pluraj japanaj Esperantistoj deziras korespondi. Skribu al Japana Esperantista Korespondi Servo, ĉe Kleg, (531) Oyodoku, Nakatu-hamadori, 3-10, Osaka, Japanujo.

42-jara teknikisto-instruisto interesiĝas pri turismo, sporto, poŝtmarkoj, poŝtkartoj ktp, deziras korespondi kun iu en Belgio. Wojciech Szczakowski, Łódź 11, ul. Mokra 23 m 59, Polujo.

EL LA NACILINGVA GAZETARO

En Belgio, la gazetaro preskaŭ ĉiun tagon parolas pri Esperanto. Tio ĉi estas fakto denove pruvita dum la pasintaj monatoj. Dum la du pasintaj monatoj 40 pli-malpli grandaj artikoloj pri la Internacia Lingvo aperis el kiuj 24 nederlandlingvaj, 9 francilingvaj, 6 germanlingvaj kaj unu anglalingvaj. Precipe kompreneble la Belga Kongreso ricevis la atenton. "Gazet van Antwerpen" grande titolis ke d-ro Brugmans substrekis la valoron de nia lingvo en la estiĝanta Eŭropo. "La Métropole" raportis nur pri la ekumena diservo. Laŭ "De Nieuwe Gazet" unu monda lingvo estas sufiĉe utopia, sed tamen se ĉiu infano nun lernus Esperanton, post unu generacio multe estus solvita. En "Doorbraak" F.R. protestis kontraŭ la fakto ke la skabeno de Antverpeno salutis la kongresanojn precipe en franca kaj angla lingvoj.

"Le Peuple" kaj "Le Travail" publikigis artikolon pri "Franz Jonas, monde konata esperantisto, prezidanto de la Aŭstria Respubliko".

En la dumonata bulteno de l' "Association des anciens et amis de l'Athénée Royal de Chatelet", D. Lambert serĉas por ni "la" internacian lingvon. Laŭ li, en sia cetere malbone dokumentita artikolo, Esperanto fiaskis pro ĝia malfacileco... La "fabrikitaj lingvoj" tute ne kontentigas la popolojn. Lambert konkludas jene: "Konstatante la malgrandan gravecon de la franca, ni faru tri jenajn decidojn: unue, lerni internacian lingvon, se eble la anglan; due, disvastigi la francan lingvon; trie, ne plu okupiĝi pri malgravaj lingvoj kiel la itala, islanda aŭ nederlanda."

Kaj por fini ni menciuj artikolon el "The Daily Telegraph" kiun ni parte tradukis por vi: "Se oni donus stipendiojn por antaŭenigo de Esperanto, la monda lingvo, la gajnantoj ĉi-jaraj certe estus s-ro Lynch, la eĵra ĉefministro, s-ro Pompidou, la franca prezidento kaj s-ro Heath. S-ro Lynch gajnus ĉar li parolis la gaelan dum la inaŭgura ceremonio de la nova Komuna Merkato, s-ro Pompidou ĉar li rifuzas paroli la anglan kaj s-ro Heath ĉar li parolante la francan eksplodigas ĉiujn francojn pro ridego." Tio ĉi troviĝis sub la titolo "La angla, nura malamiko de Esperanto".

Eduardo Soteras, Avenida de Alcoy, 95, 1º, Alicante, Hispanujo, Komencanta esperantisto, dezirus korespondi kun enloĝantoj de Belgio kaj Usono.

Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co P.vba.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

P. V. B. A.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 272875